

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (966) • 2024 •

Parto-
prenantoj
dum la
Bibliaj
Tagoj en
Neustadt
an der
Weinstraße



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@ yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun reproso aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dek helpoj — pri la Dekalogo	51
Biblia vorto kaj mia penso	56
Frua kristanismo ĉu pozitiva aŭ ne rilate al virinoj — la ekzemplo de la vualoj	57
Nacia Botanika Ĝardeno, Vácrátót	62
Bibliaj tagoj 2024 — raporto	64
Financaj raportoj	66
Tagordo por la jarkunveno de KELI	70
Kaskontrola raporto	70
Informetoj	71
Kanto: Okulo ne vidis	72

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, ĉiu-tage mi, kaj certe ankaŭ vi, legas kaj aŭdas pri terur-aĵoj grandaj aŭ malgrandaj, kiuj okazas diversloke. Ne nur malgajigas min, sed ankaŭ timigas min — kien la mondo? Kelkajn tagojn mi volonte retirus la kovrilon super min kaj elfermus la mondon. Sed tio certe ne estas mia agado kaj tasko kiel 'disĉiplo' de Jesuo. Jerald Veit skribas en siaj pensoj pri biblia versiklo, ke ni ne havu timon predikante la Evangelion (laŭ mia kompreno eble ankaŭ aliajn taskojn, kiujn ni ricevis), ĉar Jesuo estas ĉiam kun ni. Tiu scio donu al ni kuraĝon en nia laboro!

Cetere vi trovas en la nuna numero iom kontrastajn artikolojn. Unu el la dua jarcento kaj la alia de la pasinta jarcento. Laŭ mi, ĉiam estas interese iom ekkoni la pensojn de niaj antaŭuloj kaj de ili plu lerni.

Kiel kutime, en la tria numero vi ankaŭ trovas la jarkunvenajn dokumentojn. Bonan legadon!

Dek helpoj — pri la Dekalogo

Deka ordono —

Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston

(Eliro 20,16)

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

La tradicia klarigo de la deka ordono centras ĉirkaŭ la vorto ‘deziro’. Tiu, kiu ekstere povas deteni siajn manojn kaj piedojn de peko, ankaŭ pekas, se en lia koro estas revoj, envio, sopiroj kaj deziroj.

Estas la vero, ke Dio ne mezuras per ekstera sed per interna mezurilo. Ni povas citi multajn versiklojn pri tio. Ekzemple, en la libro de Samuel ni trovas tiun ĉi versiklon: “...ĉar homo vidas tion, kio estas antaŭ la okuloj, sed la Eternulo rigardas en la koron” (I. Samuel 16:7). Aŭ jen kiel Jakobo parolas pri la origino de peko: “... sed ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia dezirado, kaj delogata. Tiam la dezirado, gravediĝinte, naskas pekon; kaj la peko, maturiĝinte, naskas morton” (Jakobo 1:14–15).

Pravas tiuj predikantoj, kiuj predikas, ke eĉ la deziro estas danĝera, ke Dio ekkaptas niajn vivojn je la deziroj, ne nur je la realigitaj agoj.

Biblio-fakuloj diras, ke oni ne rajtas la klarigon grupigi ĉirkaŭ unu nura vorto. Du vortoj estas gravaj en ĉi tiu ordono, kune ili donas la originalan ideon. Unu grava esprimo estas vere “vi ne deziru”

kaj la alia estas “proksimulo”. Sed la hebrea vorto ankaŭ indikas certan agadon. Ne deziru, tio estas tute malsama ol tio, ke vi ne agu, agadu ĝis vi atingos vian celon kaj posedas iun havaĵon de aliulo. La mesaĝo ne estas, ke vi ne deziru. La mesaĝo estas, ke kiam la deziro aperas, vi ne komencu agi, ĝis vi realigos vian deziron.

Tiu ĉi ago, agado kutime celas ekposedi la objekton de nia deziro, konservante la ŝajnon de la rajto, de la leĝo. Mi konservas la ŝajnon de la leĝo kaj ekposedas tion, kio alie estas ordinara ŝtelado, rabado de la objekto de mia deziro. Do mi emfazas, ke la hebrea vorto rilatas al tiu ĉi agado. Kompreneble ĝi rilatas al la koncepto de la proksimulo, ĉar la ruzo estas direktata kontraŭ la proksimulo. Mi tiel pensas pri mia proksimulo, mi priskribas mian proksimulon tiel, ke mi poste povu ekposedi kio estas lia. La rakonto de Nabot klasike montras la ligan inter deziro kaj trompo. La reĝo ŝatas tiun vinbergardenon, kiu estas apud lia ĝardeno. Li postulas ĝin kaj petas ĝin de Nabot. Sed Nabot estas fidela, simpla, honesta judo. Li diras: Dio donis ĉi tion,

mi ne povas doni ĝin al vi. Reĝo Aĥab iras hejmen malgaje kaj amare.

Li volis ion kaj li ne sukcesis akiri ĝin. Li kuŝas, turnas sin al la muro, ne volas manĝi. Li estas kiel grumblema infano. La okazaĵo ĉagrenigas lin. Tiam lia edzino, Izebel, la pagana, malbona reĝino, venas kaj la trompo komenciĝas. Ŝi skribas leteron al la superuloj: iniciatu proceson kontraŭ Nabot ĉar li insultis Dion kaj la reĝon, poste ŝtonmortigu lin. Izebel aranĝas la aferon kun aspekto de leĝo kaj laŭleĝeco. Estas falsaj atestantoj kontraŭ Nabot, ili faras lian proceson, poste elkondukas lin ekster la urbo kaj ŝtonmortigas lin. Kaj Izebel triumfe diras al la reĝo: “Nu, prenu la landon!”

Ĉi tiu rakonto timige bone montras, al kio rilatas la deka ordono. Ĝi rilatas ne al la agadoj de reĝo Aĥab, sed al la agadoj de Izebel. Aĥab ekdeziris ion, li ne ricevis, kion li volis, kaj li komencis grumbli. Tio ne estis la vera peko. La vera peko okazis, kiam Izebel komencis agi. Deziroj naskiĝas en niaj koroj, oni ne

povas ekstermi ilin. Peko estiĝas ne tiom de la deziro, sed prefere de la ago kiu sekvas la deziron. Kaj ĝi rilatas al la proksimulo.

Nabot estis honesta subulo, honesta proksimulo de la reĝo. Por preni la teron de li, li devis esti etikedita blasfemanto kaj malamiko de la reĝo. Do la koncepto de la proksimulo devis esti malklarigita, ke Nabot iel ne estu proksimulo, sed malamiko. Se tio sukcesus, tiam eblas ŝtonmortigi lin, kaj lia posedaĵo povas esti prenita de li.

Do nun ni pli bone komprenas, kion diras la fakuloj de Biblio. La deka ordono havas du fokusojn. Unu estas ne agadu por trompo, la alia estas zorgu pri via proksimulo: meze de trompado, ne malklarigu la koncepton de proksimulo. Ili pensis, kiel Jesuo citis: “Amu vian proksimulon kaj malamu vian malamikon”. Do, se mi sukcesas iel “pruvi” tion, ke iu ne estas proksimulo, sed malamiko, tiam mi jam povas, preskaŭ rajtas, vundi tiun homon.

I.Reĝoj, ĉapitro 21, 1–11

Post tiu historio okazis jeno: Nabot, Jizreelano, havis vinberĝardenon en Jizreel, apud la palaco de Aĥab, reĝo de Samario. Kaj Aĥab ekparolis al Nabot, dirante: Donu al mi vian vinberĝardenon, por ke ĝi fariĝu por mi legomĝardeno, ĉar ĝi estas proksime de mia domo; kaj mi donos al vi anstataŭ ĝi vinberĝardenon pli bonan ol ĝi; se vi volas, mi donos al vi per arĝento ĝian prezon. Sed Nabot diris al Aĥab: La Eternulo gardu min, ke mi ne fordonu al vi la heredaĵon de miaj patroj. Tiam Aĥab revenis hejmen malĝoja kaj afliktita pro la vortoj, kiujn diris al li Nabot, la Jizreelano, dirante: Mi ne donos al vi la heredaĵon de miaj patroj. Kaj li kuŝiĝis sur sia lito kaj forturnis sian vizaĝon kaj ne manĝis panon. Kaj venis al li lia edzino Izebel, kaj diris al li: Kial via spirito estas tiel malĝoja, ke vi ne manĝas panon? Li respondis al ŝi: Kiam mi parolis al Nabot, la Jizreelano, kaj diris al li: Donu al mi vian vinberĝardenon pro mono, aŭ, se vi volas, mi donos al vi alian vinberĝardenon anstataŭ ĝi, li diris: Mi ne donos al vi mian vinberĝardenon. Tiam diris al li lia edzino Izebel: Nun vi montru vian reĝecon super Izrael; leviĝu, manĝu panon, kaj estu bonhumora:

Ĉi tiuj homoj manipulas la koncepton de proksimulo. Pro tio la deka ordono diras: Ne agu kontraŭ via proksimulo! Pensu pri Jesuo Kristo, kiom Kajafas devis agi, ĝis li sukcesis prezenti Jesuon al la homamaso kiel blasfemanto kaj templodetruanto. Kaj al la imperiestro ke li ribelis kontraŭ la imperiestro kaj la pago de impostoj. Kiom Kajafas elpensis meti Jesuon en la manojn de malbonfarantoj. Kaj finfine lia agado sukcesis. Kajafas ne ripozis ĝis li krucumigis Jesuon. La peko de Jesuo estis, ke Kajafas deziris, enviis Jesuon pro sia scio, potenco kaj populareco, kaj Kajafas agadis ĝis li sukcesis krucumigi Jesuon.

Estas moderna termino por la agado, kiun homo faras en sia animo por meti la alian personon en malavantaĝon. Tiel oni diras per fremda vorto: li diskriminacias. La deka ordono estas kontraŭ diskriminacio. Ne diferencigu iun ajn! En kio la esenco ne estas tio, ke vi mense faras iun juĝon pri la alia homo. La

esenco uzi diskriminacion estas puŝi la alian homon malsupren, sigeli lin, por ke mi povu preni de li kio estas lia. Lia domo, liaj havaĵoj, kio ajn. La deka ordono estas kontraŭ diskriminacio kaj ĉi tio estas nekredeble aktuala. Ĉar ni apenaŭ povus listigi kiom da specoj de diskriminacio estas en la mondo, kies esenco estas, ke la alia homo ne estas fidinda, oni devas, rajtas forpreni de li la havaĵon, li estas kontraŭulo, oni enkarcerigu lin, ĉar li ne estas plenrajta homo, ne estas amiko, ne estas mia proksimulo. Do fine li ne havas rajton vivi. Kontraŭ ĉi tiu homa konduto, Dio diras "ne agu kontraŭ li, ĉar li estas via proksimulo".

Kiam Jesuo estis demandita kiu estas mia proksimulo, ĝi estis tre specifa problemo. Ĉar ili pensis, ke mi havas religiajn devojn al mia proksimulo, sed ne al aliaj homoj. Pro tio necesas konkrete determini, kiu estas proksimulo.

Estis tiaj limigoj: nur judo estas proksimulo. Ne deziru la domon de via proksimulo: ne prenu ĝin de la judo, sed

mi donos al vi la vinbergardenon de Nabot, la Jizreelano. Kaj ŝi skribis leterojn en la nomo de Aĥab kaj sigelis per lia sigelilo, kaj ŝi sendis la leterojn al la plejaĝuloj kaj al la eminentuloj, kiuj loĝis kun Nabot en lia urbo. Kaj ŝi skribis en la leteroj jenon: Proklamu faston kaj sidigu Naboton sur la ĉefa loko inter la popolo; kaj sidigu apud li du homojn malvirtajn, kaj ili atestu kontraŭ li kaj diru: Vi blasfemis kontraŭ Dio kaj la reĝo; kaj oni elkonduku lin, kaj priĵetu lin per ŝtonoj, ke li mortu. Kaj la viroj de lia urbo, la plejaĝuloj kaj la eminentuloj, kiuj loĝis en lia urbo, faris kiel ordonis al ili Izebel, kiel estis skribite en la leteroj, kiujn ŝi sendis al ili

Eliro, 2a libro de Moseo, ĉapitro 20, 17a:

Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinton, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

kompreneble vi povas preni ĝin de iu alia. Estis tiuj, kiuj diris, ke mia proksimulo estas nur tiu, kiu observas la sabaton, la sabatan leĝon. La ceteraj eble estas judoj, sed ili ne estas miaj proksimuloj. Estis konstanta diskriminacio, kaj la rondo ĉiam malvastigis, en kiu estis ankoraŭ ia homa tasko. Ne ekzistas dia ordo al la ceteraj. Tiel ili alproksimiĝis al Jesuo: kiu estas mia proksimulo? Responde al tiu ĉi demando, Jesuo rakontis la parabolon de la bona samariano kaj emfazis la ideon, ke ĝuste tiu estas via proksimulo, kiun vi volas diskriminacii. La ideo de Dio estas, ke eĉ tiu, kiun vi ne amas, estas via proksimulo. La samariano, kiun vi pretas diskriminacii per rasa diskriminacio, estas ankaŭ via proksimulo. Kiel li “hontinde” nomas la judon proksimulo. La ideo de Jesuo estas, ke ni ĉesu diskriminacii kaj ni konsideru la apudan personon kiel proksimulon. Sed Jesuo preterpasas ĉi tion kaj proklamas la amon de la malamiko: “Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj” (Mateo 5:44).

Estas populara diraĵo, “Atentu, ĉar via hodiaŭa amiko estas via morgaŭa malamiko”. Ne estu tro konfidenca kun via amiko, ĉar morgaŭ li fariĝos via malamiko kaj mistraktos tion, kion vi diras al li hodiaŭ. Jesuo renversas tiun ĉi popolan saĝon kaj diras: risku ion, ĉar sur tiu ĉi vojo via hodiaŭa malamiko estos via morgaŭa amiko. Kiam Jesuo diras: amu viajn malamikojn, li ne predikas sentimentalismen. Ĉi tio ne signifas, ke vi pro sekureco ne batu la alian homon, ĉar li estas pli forta ol vi, kaj prefere montru iun falsan amon defendi vin mem.

Sed tute male: batalu por fini malamikecon, sed per amo. Amu viajn malamikojn, jen la kutima akra vortumo de Jesuo. Ĝi signifas iniciati iun utilan agon al via malamiko per la espero, ke ĝi estos efika kaj la malamikeco ĉesos.

Ni pripensu kaj komprenu ĉi tiujn tri kondutojn!

Unu el la kondutoj estas ago, agado: kiel eltiri kiel eble plej multe de la proksimulo, por ke mi pli multe kaj pli bone havu.

La dua homa konduto estas, ke mi nek rabas nek helpas lin. Mi ne zorgas pri li. Por mi, tiu alia persono estas aero, kvazaŭ li ne ekzistus. Lastatempe, ĉi tiu konduto komencas disvastiĝi inter homoj. Ni estas lacaj de malamikeco, ni timas amikiĝi, do lasu la alian personon esti al mi aero, nenio. Ni iru unu apud la alia, por ke ni kiel eble plej malmulte ĝenu la rondojn unu de la alia.

La tria sinteno estas la penso de Dio: amu viajn malamikojn. Faru ion por la alia. Homoj kutime kondutas en reakcia maniero, ne en politika senco, sed en psikologia senco. Kareso por kareso, venĝo por venĝo. Kiel estas la ago, tiel estas la reago. Ĉi tio estas proksimume la vidpunkto de tiel nomata vero. Okulo pro okulo, dento pro dento. Sed ĉi tio ne estas kristana konduto. La ideo de Dio estas, ke vi agu. Eĉ! Se la alia homo komencis malbonan agon kontraŭ vi, vi komencu amikan, pacan agon. Esti kristano signifas ne reagi al aferoj mekanike, kiel estas laŭleĝe laŭ la reguloj de psikologio. Esti kristano signifas respondi malsame. Ĉerpi forton el iu speciala rimedo, por ke

mi ne reagu en la maniero, kiun oni atendas de mi.

Staranta milito, tranĉea milito estas, kio okazas en ĉi tiu mondo. Homoj fosas sin en iun tranĉeon de malamikeco, rigardas kiam la alia donas ofendan surfacon, kaj poste pafas kaj retiriĝas. Jesuo diras: eliru el la tranĉeoj! Ekspozi vin ricevi pafadon. Iru tien kaj donu al li pacan ligan. Ĉi tio estas riska afero, sed esti kristano signifas ĉi tion: Fini la konstantan militon, antaŭeniri, alproksimiĝi kun bonvolo. Proponi: ni paciĝu!

La malnovtestamenta ordono antaŭenigas la penson de Jesuo. La malnovtestamenta ordono estas negativisma: ne agu kontraŭ via proksimulo! Jesuo diras pozitive: vidu vian malamikon kiel proksimulon kaj paciĝu kun li. Aŭ por diri ĝin alimaniere: la Malnova Testamento diras: ne faru diskriminacion! Kaj la Nova Testamento predikas la evangelion al diskriminaciitoj. Ĝi rakontas al la etuloj, al la forpелitoj, al la rabitaj, al la pekuloj, al la malindaj la gajan novaĵon, la evangelion, ke Dio ne diskriminacias vin kiel la ĉefpastroj kaj la imperiestro. Cetere, li bonvenigas vin, malsanuloj kaj pekuloj, kun speciala amo. Ĉi tiu kolizio de pensoj estas tre interesa. La Malnova Testamento nur malklare diras: ne praktiku ĉi tiun malbonan aferon, diskriminacion. Jesuo aldonas: kaj se vi estas diskriminaciita, ne malĝoju, ĉar la amo de Dio estas ĉefe por tiaj homoj. Kaj se Li akceptis vin, kiu estas diskriminaciita, Li akceptis vin por esti Lia kunlaboranto en disrompado de la vandoj. Kaj se tiel estas, tiam terura estas la konduto de la kredantoj, la maniero kiel ili kunprem-

iĝas: ni estos savitaj, vi estos damnitaj, vi brulos en eterna fajro. Ĉi tio estas malbona kaj homoj de fido devas ĉesi fari ĝin. Estas vero, ke Dio bonvenigas tiujn, kiuj estas diskriminaciitaj, sed Li ne vokas ilin por fari kontraŭ-diskriminacion, sed resendas ilin: nun estu fratoj inter fratoj kaj disrompu ĉiujn murojn de malamo, por ke la homoj finfine povu fratiĝi. La deka ordono diras: ne diskriminaci! Kaj Jesuo parolas tiel: se vi estas diskriminaciita, Dio amas vin. Li konsolas vin kaj resendas vin al la aliaj por malkonstrui la vandojn.

—

Do, kio estas la Dek Ordonoj kaj kiel ni, homoj de fido, rigardu ilin? La Dek Ordonoj ne estu rigardataj kiel kolekto de medicinaj priskriboj por fari ion kaj vi resaniĝos kaj vi estos en ordo. La Dek Ordonoj estas kompaso, kiu montras al vi, en kiu direkto vi devas serĉi la solvon. Estas malbone, se iu prenas la Dek Ordonojn kiel recepton kaj volas agi tiel, ke ĝi fariĝas savo. Estas bone, se vi trovas spiritan, gvidantan helpon en ĝi kaj orientigas vian animon al tiuj direktoj de la vero, kiujn Dio montras al vi.

Oni povas levi la demandon, kio estas la morala malbono en la mondo. Ĉu estas tiel, ke homoj scias, kio estas bona, sed ili ne volas agi laŭ ĝi? Se tio estas la kazo, eble estas loko por riproĉado. Sed mi kredas, ke ne tiu estas la morala situacio. La morala situacio en la moderna mondo estas, ke homoj ne scias kio estas bona, la normoj estas konfuzitaj. Laŭ mia observo, la hodiaŭaj homoj vere ne scias, kio estas bona kaj kio estas malbona. Kaj tiam tute ne estas loko por riproĉi, ĉar

kiel oni povas riproĉi blindulon, se li enpuŝas la tablon? En la plimulto de kazoj, moderna homo pekas malsukcesante rekoni kio estas vera kaj kio estas bona. En ĉi tiu moderna situacio, la Dek Ordonoj havas grandegan gravecon. Sed ne kiel receptlibro, sed kiel kompas, kiu montras en kiu direkto troviĝas homfariĝo.

Por la granda spirita gvidado de la Dek Ordonoj, unue necesas la specifa gvidado de la Sankta Spirito por montri al mi, kiel decidi en la specifa problemo bazita sur la larĝa direkto. Se mi silentos antaŭ Dio, Li donos al mi klarecon pri tio, kion mi faru pri ŝtelo, geedziĝo kaj amo al proksimulo. Neniu povas anstataŭigi ĉi tiun konkretan helpon kaj gvidadon de la Sankta Spirito: neniu eklezia kaŭzismo, neniu pastora parolo. Ĉi tiu estas unu, kiun ni bezonas.

La alia estas la potenco de la Sankta Spirito. Ĉar vere okazas, ke la vero brilas antaŭ mi kaj mi estas ankoraŭ tro malforta por agi. Do, la eklezio, la komunumo, kiu kunvenas en la nomo de Jesuo Kristo, devas vivi kun/per la Dek Ordonoj tiamaniere: ili estas eminentaj direktumoj, la subtilaj vibroj de la kompas laŭ la maniero, kiel Dio pensis pri la homa vivo. Ĝi montras la direkton, sed ene de tio ni bezonas la specifan ordonon kaj potencon de la Spirito por povi agi.

Dio benu nin, por ke ni ne nur kunportu la lumon, kiun ni ricevis, sed kresku en niaj koroj la deziro agi tiel konkrete. Ni petu la lumon de la Sankta Spirito, kaj ĉefe la forton kaj potencon de la Sankta Spirito por ke ni povu iri ĉi tiun vojon.

✞

Karaj, “Sed kelkaj dubis ...” Eĉ vizaĝo al vizaĝo kun Jesuo mem, kelkaj disĉiploj havis dubojn. Kiel tio eblus? Kaj kiel ni, ordinaj nuntempaj homoj, kiuj neniam spertis la fizikan ĉeeston de Jesuo, povas eviti havi niajn proprajn dubojn? Tamen spite al tio, Jesuo donas al la disĉiploj kaj al ni la saman ordonon: ni iru en la mondon kaj prediku ĉie la Evangelion, ne havante timon, ĉar Jesuo estas ĉiam kun ni.

Jerald Veit

Mateo 28:16-20

Sed la dek unu disĉiploj iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo jam difinis al ili. Kaj kiam ili vidis lin, ili adorkliniĝis al li; sed kelkaj dubis. Kaj Jesuo venis al ili, kaj diris al ili: Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.

Frua kristanismo ĉu pozitiva aŭ ne rilate al virinoj – la ekzemplo de la vualoj

Gerrit Berveling, NL

Antologio Latina, volumo 5 havas la subtitolon : Frua Kristanismo. Kiel oni povis konstati ĝis nun, en Antologio Latina pasas la rigardon pluraj konataj kaj ne konataj aŭtoroj. (Vidu ĉe Vikipedio.) Kelkaj ĉe tio ricevas klare pli da atento ol aliaj. Tio ne nur estas pro preferoj de la kompilinto, kiu ja kunrolas, sed iasence ankaŭ por respeguli certan “objektive” konstateblan gravecon: ni menciui ĉi tie la paĝonombron, kiun ricevas la plej “amplekse” reprezentitaj aŭtoroj:

Okulfrappe atentataj aŭtoroj

Vol 1: Plaŭto – 17 p, Cicerono – 69 p, Lukrecio – 18 p, Katulo – 19 p.

Vol 2: Vergilio – 48 p, Horacio – 63 p, Propercio – 13 p, Tibulo – 20 p, Ovidio – 47 p, Livio – 44 p.

Vol 3: Fedro – 11 p, Seneko la Juna – 58 p, Petronio – 32 p, Iliado Latina – 15 p.

Vol 4: Marcialo – 27 p, Plinio la Juna – 25 p, Tacito – 42 p, Apulejo – 58 p, Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita – 16 p.

Vol 5: Tertuliano – 67 p, Cipriano – 67 p, Martiraktoj – 25 p, Diktiso de Kreto – 13 p.

Do, plej da atento iras al Cicerono en Volumo 1, al Horacio en 2, al Seneko en 3, al Apulejo en 4 kaj al Tertuliano kaj Cipriano en 5.

Kio faras Ciceronon tiel grava? Nu, tutunue ĉar li formis la tradicion de l’

Klasika Latina – lingve, stile, vortare: multege da filozofiaj esprimoj estas liaj manieroj redoni la Grekajn nuancojn. Kaj Horacion, kio faras lin tiom grava? Supozeble plej multe la fakto, ke li – pli ol ĉiuj ceteraj literaturistoj – klopodis rivalante kun la Grekaj klasikaj poetoj, se eble atingi la saman zeniton. Pri Seneko kaj Apulejo – kion ni diru? Ambaŭ ege legindas.


Tertuliano (ĉ 155-ĉ 230)

En la nova volumo precipe mi menciui pri Tertuliano. Jam mezlerneje min frapis ties lingvaĵo: ofte li uzas vortojn ne tute kutimajn, multajn kristanismajn terminojn enkondukis li. La plej fama verŝajne estas Trinitas, Trinitatis – por la Dia Triunuo. Efektive tiu vorto signifas nur Trieco.

Dum mia mezlerneja tempo, kiel lernanto, unuafoje mi legis-deĉifris kelkajn paĝojn el lia *Apologeticus*, kiun poste en Esperanton mi tradukis sub la titolo Apologio. Nian tiaman instruiston pri la Latina mi nepre menciui: Monsinjoro d-ro C.J. HENNING. Li estas unu el la plej inspiraj instruistoj kiujn mi memoras. Kaj kiel brile li sciis voĉlegi la Latinan poezion. Ho mi ĝuis tion. Lia prononco estis absolute perfekte Itala. Sed eĉ li – kiu tiel kompetente kaj allogie sciis klarigi kaj traduki – foje diris, ke por

li ankoraŭ restas komplika Tertuliano, tiu unua grava aŭtoro kristana en la Latina.

Tio por mi tuj malfermis novan fenestron: tian aŭtoron mi volis vidi de pli apude. Tiun mi ekkonu. Do tial jam eĉ mezlerneje mi ekatakis la bastionon Tertuliano kaj post tiom da jaroj (ekde 1962) li ankoraŭ restas fascina al mi.



Kion tra la jaroj do mi legis ĉe Tertuliano?

- Pri frua kristanismo, kiel vivis la komunumoj, la realo de la persekutadoj.
- La kredo, la kristana fido, kiel li vortigis ĝin, kiel li provis klarigi ĝin.
- La profunda devoteco antaŭ la Biblio kiel parolo de Dio.

Oni ne forgesu, ke tiutempe ankoraŭ ne ekzistis bone ordigita bibliotraduko. Tertuliano legis ĝin Greke – en la Septuaginto, supozeble. Kaj se tradukan eron li bezonis, li mem havigu ĝin. Ne devas esti estinte por li tre malfacile. Tertuliano ja ankaŭ mem verkis Greke, kvankam liaj Greklingvaj verkoj perdiĝis. – Kontraste al Aŭgustino, kiu neniam lernis laŭ propra eldiro bone regi la Grekan.

Ofte frapas min, ke Tertuliano jam mencias temojn, pri kiuj oni multloke en nia mondo kvazaŭ nur ĵus ekdiskutis. Ekzemple ke ĉiu parolado pri Dio estas ja bilda, metafora parolado. Dio ne havas manojn kiel ni homoj havas manojn – jam Tertuliano tion sciis. Se oni parolas pri la manoj de Dio tio estas por diri ke Dio estas aganta. K.s. belan ekzemplon mi renkontis ekzemple en lia *Adversus Marcionem* (Kontraŭ Marciono) II:25 – Tie en Genezo Dio diras al Adam: “Kie vi estas, Adam?”, sed Tertuliano komentas, ke tio klare ne estas informpeto flanke de Dio, kiu kvazaŭ ne scius, kie troviĝas Adam, sed ke estas demando, kiun oni legu kiel avertilon: “Ho, kie vi estas, Adam!” – Dio atentigas Adamon pri lia devo. Same en la rakonto pri Sodom kaj Gomorra: ĉu Dio do estus senscia pri tio, kio okazas? ĉu Li devos descendi por ekhavi pli da certeco, pli da informoj? kompreneble ke ne. Dio JA scias, kio okazas – ktp. Do estas metafora parolado pri Dio. Tertuliano diras (II:27.7): “Dio ekas hommaniere konversacion kun la homo, por ke la homo lernu agi kiel Dio.”

Sed ĉi tion en la Antologio Latina vi ne trafos.

Kion jes vi trafos ĉi-volume ĉe Tertuliano?

Nu, enestas unue eretoj el lia Apologio [piednoto: Ne forgesu, ke la tuton jam depost 1980 eblas legi en Esperanto.]: ĉi-framente ni vidas, ke kristanoj ne kulpas je krimo aŭ malmoralo (de Tertuliano, ankaŭ en aliaj verkaĵoj, oni scias ke kristanojn, kiuj tion kulpas, liaopinie oni nepre elpelu el la eklezio – li estis sufiĉe

rigora en tio!), krom tio jen fragmento kie li provas montri, ke efektive ĉio valoras ĉe paganaj filozofoj fakte devenas – ŝtelita! – el la Biblio: ja liaaserte tiom pli aĝa ol ekzemple Platono! La moderna biblioscienco ankoraŭ ne estis inventita. Morti por sia konvinkigo – alivorte martirigo – estas unu el la plej fortaj varbiloj de kristanismo: “semo estas la sango de kristanoj”.

Antaŭ longe – en 1970 – CED aperigis la verketon *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* de Isaj DRATWER. IVO LAPENNA enkonduke ĝin laŭdas: kaj kion do faras Dratwer? Li amasigas citaĵojn el plej diversaj fontoj kaj epokoj por montri kiom da homoj jam opiniis, ke Esperanto estas grandioza. Oni rajte povas demandi sin, kiun efektive Dratwer tiel konvinkis? Ĉu eksterulojn, aŭ ĉu nur jamajn esperantistojn? – Same faras nia “Tert” en *Pri la atesto de l’ Animo*. Sed en multe pli brila stilo – mi esperas ke tiu stilo restas sentebla.

Poste legeblas *Al la Martiroj* – 6,5 paĝoj – do sufiĉe modesta, amplekse: en ĝi al kristanoj enŝlositaj pro la fido li provas doni konsolon kaj fortigon: parenteze, la sola ekzisto de ĉi verketo jam montras, ke ŝajne inter kaptitaj kaj ne-kaptitaj homoj en la Romia socio la fizikaj baroj ne estis tiel grandaj: ili povis interrilati, doni aferojn unuaj al la aliaj. Same kiel nuntempe oni niasocie uzas multe da Anglaj esprimoj ĉe sporto, same tiel tiutempe oni uzis Grekajn esprimojn: Tert uzas tutan faskon da ili. Kerna estas ĉi-tekste la konvinkigo, ke baldaŭa morto pro la fido estos sava por la kristanoj. Kvankam multrilate estas teksto tute ne

el nia nuna mondrigardo, mondpercepto, tamen mi kredas ke ankaŭ nunuloj povas kun-senti ĝian sinceron kaj ĝian profundon.

Sekvas same komplete la multe malpli konata *Pri la vualoj de la virgulinaj*, 25-paĝa.

El *Preskripto kontraŭ la Herezuloj* sekvas 3 paĝoj: en ili Tert i.a. montras sian konvinkon, ke kristanoj ne bezonas la paganan filozofion.

Unu el liaj plej influaj verkoj estas *Kontraŭ Marciono* – dikega verko, pri kiu 10 paĝoj devas almenaŭ iom doni impreson: Marciono estas la unua kristana Gnostikulo, kiu akre kontraŭis Judismon. Tert provas montri, ke ne havas sencon esti kristano, se la Malnovan Testamenton oni malakceptas: ĝin ni kristanoj ja prave heredis de la Judoj; ambaŭ atestas pri unu sola kaj sama Dio. La debato ĉirkaŭ Marciono estigis la debaton pri la kristana kanono de la Nova Testamento.

El *La Spektaĵoj* sekvas 3,5 paĝoj: spektaĵojn, same la spektatajn buĉadojn (tiuepoke i.a. interbuĉado de gladiatoroj) kiel teatraĵojn la kristanoj ne ĉeestu – en tio Tert samopinias kun Seneko. Sidi ĉe spektaklo ja estigas ian amashisterion, ĉe kio oni ne plu regas sin mem.

Nu, jen tiel almenaŭ iel vi havas impreson pri tio, kion pri Tert ĉi-volume vi povas eklerni.

Pri la vualoj de la virgulinaj – la plej longa kohera teksto de Tert ĉi-volume

Kaj precipe pri tiu verkaĵo mi volas iom babili kun vi. La temo estas sufiĉe ĝenerale

konata: multaj nuntempe, precipe virinoj, konas Tertulianon nur kiel “la viron kiu misjuĝis la virinojn”, “subpremis la virinojn” aŭ simile.

La instigo verki ĝin estis okazaĵo en Kartago, kie grupo da kristanaj junulinoj sub la moto “en Kristo ni estas liberaj” forĵetis de si la vualojn. Ja tiukulture kutime ĉie kaj ĉiam ĉiuj virinoj portis vualojn. Kaj ĉe Paŭlo ili legis, ke en Kristo “ne plu estas Judo nek Greko, ne plu sklavo nek liberulo, ne plu vira nek ina : ĉar vi ĉiuj estas unu en Mesio Jesuo” (Galatoj 3 :28, cito el *Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo.*) Okazis en Kartago granda skandalo: la publika deco estis lezita, ktp. Aliaj kristanaj virinoj kontraŭis tiun skandalan konduton de la koncernaj virgulinoj – unuvorte: la ekleziaj gvidantoj kredis neeviteble, ke ili forte reagu. Same faris Tert, per ĉi tiu verkaĵo.

Enhaven estas antaŭdireble: la virgulinoj ree eniru sian ŝirmatan vivmedion, tenu sin for de provokado ktp – la virgulinoj sin vualu !

Generacion poste vivis Cipriano, en la sama Nord-Afriko. – La kristanismo tiepoke en Italujo ankoraŭ estis Greklingva, la unuajn Latinajn kristanajn tekstojn oni renkontas dum pli ol generacio nur en Nord-Afriko.

Por mi persone – kaj ankaŭ kiel pastoro – tio ĉi ne plu estas serioza teologia temo, sed tamen ni prenu serioza la traktadon en tiu epoko. Estas mia opinio sence vidi, kiel en aliaj tempoj oni aliras difinitajn temojn.

Cipriano, same kiel Tertuliano emfaze diras, ke la virinoj – ĉiuj ! – nepre portu la vualojn. Do enhance nenio ŝanĝiĝis.

Tamen, foje oni legu paralele al lia Pri la vualoj de la virgulinoj la tekston de Cipriano – generacion post li – : *Kiel sin tenu la virgulinoj*, por iom kompari ilin: kia diferenco ! Ne en la fina verdikto, ke la virino ja silentu en la kunvenoj k.s. – sed tio ne estas karakteriza por ilia traktado de la temo kaj ilia juĝo.

Ĉe Cipriano oni preskaŭ nur ĉentonon oni renkontas el citoj de Paŭlo kaj Duapaŭlaj leteroj: jen, li kvazaŭ diras: legu kaj vi konvinkiĝos. Tiel kaj nur tiel ili faru ! En 1985 aŭ 1986 mi tradukis la tekston de Cipriano en la Nederlandan kaj disdonis ĝin inter la ĉeestantaj membroj de kunveno de la landa Remonstranta Virina Kontakto (RVC), kie kiel pastoro mi povis gvidi studotagon. Cipriano vekis sufiĉe fortan diskuton pri virinaj rajtoj en eklezioj tra la tempo.

Sed ne tiel simplisme nur biblio-erojn citadas nia Tert: lia libreto komenciĝas per diskuto pri diferencoj inter “kutimo” aŭ “deviga regulo (la Vero)” ; la kristanan fidon poste Tert tre mallonge resumas: jen kion ĝi enhavas – la cetero estas diskuto. La debato pri konkretaj vivreguloj prenas plurajn ĉapitrojn: la fakto ke iu ne kapablas teni sin je certa regulo, ne estas kaŭzo nuligi tiun regulon (ĉapitro 3). Transiras la rezonado al la demando, ĉu ĉi tie temas vere nur pri virgulinoj – sed ne! ĉar plurloke Paŭlo klare distingas inter virino kaj virgulino, sed koncerne la vualojn ne. Sekvas diskutado pri la vortoj virino kaj virgulino, inkluzive ne nur de la Latinaj aŭ Grekaj vortoj sed ankaŭ de la Hebraj. Tert do montriĝas uzi ankaŭ foje la Hebrean. Sekvas pritrakto de

pluraj detaloj el Genezo. Kaj en ĉapitro 6 venas la demando: kiujn vortojn do uzas en ĉi tiaj tekstoj Paŭlo. Demando kiu indas je serioza bibliostudanto. Tert komparas inter citoj el Paŭlo kaj citoj el Genezo. Kaj kion signifas “ĉiu virino”, ĉar ĉe Paŭlo oni legas ke “ĉiu virino” havas klaran devon vuali sin. Sekvas debato pri eklezia disciplino kaj ties kutimoj (ĉapitroj 9-10). Ĉapitro 11 komenciĝas per “por per la sekva diskutado ne disŝiri la koheron...” Traktiĝas la vestado de fianĉino okaze de festo ktp – i.a. ke kelkaj virinoj interpretas la temon malsame ol aliaj. Li ankaŭ traktas pri loka episkopo, kiu foje distingis difinitan virgulinon per rajtigo, ke tiu dum diservoj ne portu la vualon, kaj la demando, ĉu tia episkopo fakte tion rajtas fari... Ĉapitro 16-17

donas konkludon, i.a. ke eble foje la paganaj Arabaj virinoj hontigos la kristanajn virinojn, ĉar ili – tiuj paganinoj – kovras “ne nur la kapon, sed ankaŭ la vizaĝon ili komplete tegas, kaj al ili sufiĉas havi unu okulon libera por ĝui la lumon nur duone, prefere ol prostitui sian tutan vizaĝon”. Tert do jam konas la nuntempe tiel ofte diskutatajn tutvizaĝajn vualokovraĵojn. – Do, entute: Tertuliano prezentas traktadon de la temo – ĉu la virinoj portu vualojn aŭ ne – plurflanke kaj, certe por tiu epoko, sufiĉe serioze. Dum lia lerninto Cipriano ĝin traktas nur kvazaŭ temus absolute nur pri amasigado de biblio-citaĵoj.

Laŭ mi [inter ili estas] mondo da diferenco !



Tertuliano (ĉerpita el Vikipedio)

Quintus Septimius Florens Tertullianus, en Esperanto konata kiel TERTULIANO (ĉ. 159 – ĉ. 230) estas latinlingva aŭtoro de l' frua kristanismo. Eklezi-historie li pleje gravas kiel defendanto de la kristanismo kontraŭ la pagana mondo en kiu li vivis, kaj pro tio, ke li estis la unua uzi plurajn gravajn teologiajn terminojn. Ekzemple la vorto “Trinitas” (fakte trieco, de kie oni ekuzis: Triunuo) por la teologia tipe kristana aserto, ke Dio estas la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

Li naskiĝis en Kartago, kiel filo de romana oficiro. Kelkaj asertas, ke Ario estas malproksima parenco lia. Ĉirkaŭ la jaro 190, pli malpli 30-jara, li konvertiĝis al kristanismo. Li studis en Romo la klasikajn fakojn (gramatiko, retoriko, juro) kaj laboris kiel advokato. Ĉ. 195 li revenis al Kartago, kie li ekaktivis teologie. En lia verkaro ofte konstateblas jurista rezonado. Interalie li verkis kontraŭ la Judoj, kontraŭ Gnostiko, kontraŭ Marciono, kontraŭ pluraj herezoj kaj kontraŭ baptado de infanoj. En sia Apologio li brile defendis kristanisman.



Pli poste li aliĝis al kristana movado, kiu etike estis pli ekstrema ol la ĝenerala katolika eklezio: montanismo.

Dum la persekutadoj epoke de imperiestroj Komodo (180-192) kaj Septimo Severo (193-211) li verkis interalie la libreton "kuraĝigo al la Martiroj". El la sama periodo datiĝas la Pasiono de Perpetua kaj Felicitas, kiun pli frue oni atribuis al li; nuntempe kelkaj supozas, ke Tertuliano almenaŭ redaktis ĉi tiun tekston.

Lia influo estas grava al la verkoj de Cipriano kaj Aŭgustino. ❧

Post pluraj propriet-ŝanĝoj, en 1871 Sándor VIGYÁZÓ aĉetis la bienon kun ĝia tuta ekipaĵo, brutaro, kaj movaĵoj.

Sándor Vigyázó (1825–1921) estis larĝmensa, strikte morala, granda patrioto. Lia enorma riĉaĵo estis plu pliigita per la doto de lia edzino, Zsuzsanna PODMANICZKY.

La juna paro loĝis komence en Vieno, sed la patrioto Sándor VIGYÁZÓ sopiris hejmon, do li rekonstruis la malnovan domegon sur sia nova posedaĵo en eklektika stilo kaj meblis ĝin digne. La bone edukita posedanto ankaŭ amis la naturon, en sia junaĝo li vizitis multajn gravajn parkojn en okcidenta Eŭropo. Li invitis la plej bonan hejman ĝarden-dezajniston, la faman Jámbor VILMOS, kiu ankaŭ laboris por arkiduko Jozefo, por transformi lian kastelĝardenon. En la daŭro de


kelkaj jardekoj, sub la direkto de la ĉefĝardenisto Henrik Band, sentimentala pejzaĝa ĝardeno estis kreita laŭ la tiama stilo, ĝuste laŭ la amplekso de la hodiaŭa ĝardeno.

Uzante la akvon de la rivereto kiu fluas tra la Ĝardeno, per grandegaj terremparoj kaj per la utiligo de la ekzistanta lago, lago-sistemo estis kreita. Kun la granda kvanto de elfosita tero, la deklivaj montoflankoj fariĝis eĉ pli diversaj. Dum pluraj jaroj, la plurpaŝitaj ŝtonoj necesaj por la konstruado de la Ĝardeno estis transportitaj per ĉaroj de la proksima monto, kaj naturaspektaj ŝtonaj flankoj estis formitaj. Por plifortigi la romantikan atmosferon de la Ĝardeno, akvomuelejo estis konstruita sur la bordo de la rivereto en 1890. Artefarita akvofalo estis establita en la mallarĝa valo super la lago.



De maldekstre:
edzino de
Ferenc Vigyázó
(Zsuzsanna
Podmaniczky),
iliaj infanoj kaj
Ferenc Vigyázó

Grafo Sándor VIGYÁZÓ mortis en 1921 en la aĝo de 96 jaroj. En sia testamento, li donacis sian grandegan riĉaĵon, sian bibliotekon, sian valoran kolekton de artaĵoj, siajn kastelojn, urbajn palacojn kaj milojn da hektaroj da tero al la Hungara Scienca Akademio. Lia filo Ferenc, kiu postvivis sian patron nur sep jarojn, faris testamenton en simila spirito.



La dua mondmilito kaŭzis teruran detruon en Vácrtót, kiel en tiom da niaj belegaj kaj valoraj kastelĝardenoj. En la somero de 1945, centoj da rusaj soldatoj estis postenigitaj ĉi tie en bunkroj kaj tendoj. Post kiam la batalado finiĝis, brikaj rubaĵoj, aŭto-vrakoj, radoj, ferpecoj, inkluzive restaĵoj de municio kaj de pafaĵoj, estis disŝutitaj ĉie. Ĉiuj pordoj kaj fenestroj de la Domego mankis, la konstruaĵo estis tute prirabita, la ĉambroj estis plenaj de sterko, ĉar ili estis uzataj kiel ĉeval-staloj. La vojoj de la Ĝardeno estis superkreskitaj de fiherboj, ĝiaj lagoj estis ŝlimigitaj, kaj ĝiaj arboj estis konstante bruligitaj de la loĝantaro. Post la mondmilito ĝi iĝis forlasita, kaj en 1946 ĝi estis donacita al la Nacia Muzeo de Natursciencoj.

Dum la rekonstruo devis transporti de la areo amasegon da ruboj per pli ol ducent ŝarĝaŭtomobiloj!

En 1952 realiĝis la intenco de la testamentantoj: la posedaĵo iĝis posedaĵo de la Hungara Scienca Akademio kaj la 1-an de januaro 1952 tie fondiĝis la Botanika Esplorinstituto de la Hungara Scienca Akademio.

La ĉefa aspekto de la evoluo de la Ĝardeno devis konservi la malnovan formon de la Ĝardeno eĉ kiam la novaj kolektogrupoj estis kunvenitaj. Uzante la ĝardenplanon faritan en la lasta jarcento, la origina vojreto estis reestigita, la areo estis purigita de fiherboj kaj arbustoj, la lagoj kaj fluejoj, kiuj ege ŝlimiĝis dum jardekoj estis purigitaj, kaj novaj strukturoj kaj lignaj pontoj estis konstruitaj. Grandskala plantdisvastigo estis komencita por anstataŭigi la forvelkantan vegetaĵaron.

La Nacia Botanika Ĝardeno havas la plej riĉan kolekton de vivantaj plantoj en Hungario, igante ĝin la plej grava botanika ĝardeno en nia lando.

Mi volonte montros al vi ĉi tiun mirindan ĝardenon dum nia ĉijara kongreso.

Erzsébet Fráter, biologo kaj botanikisto, honora lektoro de la Universitato de Debrecen, gvidos nin tra ĝardeno per promonado per titolo “Plantoj de la Biblio”.



Kiam oni petis min skribi ion pri la Bibliaj Tagoj en Neustadt an der Weinstraße, venis en menso ĉiaj personaj pensoj. Pensoj pri la unuaj horoj, kiam mi apenaŭ konis iun kaj mi ankoraŭ ne sentis min tute komforta. Pensoj ankaŭ pri la konversacioj, kiujn mi havis kun la aliaj. La bonŝanco gajni la Biblian kvizon. (Mi neniam gajnas kvizojn.) La memoro pri la deserto, kiu min frapis el la manoj de mia najbaro, kiam li estis eksidonta, kaj kiu alteriĝis sur mian dorson. En tiu momento mi larĝe gestikulante rakontis al mia najbarino pri mia plej unua deserto en Germanio, kiam mi estis 5-jara, kiom malbongusta ĝi estis; kiel mia patro fotis min ploranta; kaj ke mi efektive amis ĉi tiujn desertojn. Ĉi tiuj estas pensoj, kiuj ankaŭ kolorigas ĉi tiujn Bibliajn Tagojn (en ĉi tiu lasta kazo malhelruĝa de la ĉerizoj).

Estis kvin tagoj kun tre plena programo, dum kiuj ĉeestis 28 partoprenantoj el Germanio, Pollando, Francio, Nederlando kaj Slovakio.

La mateno komenciĝis per preĝado de la rozario, por ĉiuj, kiuj volis partopreni. Post matenmanĝo ni havis matenajn preĝojn kaj kantorondojn. Poste Wolfram Rohloff* klarigis al ni Bibliajn tekstojn. Post tagmanĝo ni ĉiu foje vizitis vidindaĵojn en la regiono. Kaj vespere post la vespermanĝo estis vesperaj preĝoj kaj Kristana Diservo aŭ prelegoj.

La Bibliaj Tagoj okazis en la junulargastejo Pfalz (Pfalz-Jugendherberge) en Neustadt an der Weinstraße, je 10-minuta piediro de la fervoja stacidomo. La dormoĉambroj, festadoj kaj edukado same kiel manĝoj estis en la sama konstruaĵo. Ĉiutage ni havis tri bone preparitajn manĝojn.

Dum la festoj ni kantis el la kantolibro Adoru. Kvankam la tekstoj estis novaj por mi, multaj melodioj estis konataj al mi, ĉar ili estas kantataj ankaŭ en Nederlando en la protestantaj aŭ romkatolikaj preĝejoj. Por mi ĉi tio konfirmas, ke niaj eklezioj kune formas unu Eklezion.

Wolfram kondukis nin tra la unuaj ĉapitroj de Genezo, la unua libro de la Biblio. Ĉi tiuj rakontoj temas pri kreado de la mondo, la disvastiĝo de homoj sur la tero, la turo de Babel kaj pri Noa. Nia scio pri ĉi tiuj rakontoj estis provita per Biblia kvizo. Wolfram klarigis ke tiuj rakontoj ĉiam estis skribitaj kiel protesto kontraŭ la normoj kaj valoroj de la tempo en kiu ĉi tiuj tekstoj estis skribitaj. En la tekstoj pri la kreado de la mondo la mitoj de tiu tempo estis malkonfirmitaj: la suno, luno kaj steloj ne plu fariĝis adoreblaj dioj, sed lampoj kiujn Dio kreis. En tiuj tekstoj virinoj ne plu estis vidataj kiel estaĵoj, kiujn viroj povis preni laŭplaĉe, sed ricevis egalan dignon kun viroj. En la postaj rakontoj homoj fariĝas ĉiam pli malproksimaj de Dio kaj Liaj celoj.

Homoj fariĝas pli perfortaj. Nur kun la voko de Dio al Abrahamo kaj Sara iri al Israelo denove aperas proksimiĝo inter Dio kaj homoj.

Posttagmeze ni havis ekskursojn.

Ĵaŭde ni vizitis la mezepokan kastelon de Hambach, tri kilometroj for de nia junulargastejo. En 1832 proksimume 30 mil homoj el Germanio kolektiĝis tie por politika manifestacio, la Hambach Festivalo (Hambacher Fest). Ili pledis por fundamentaj rajtoj, politika libereco, egaleco, toleremo kaj demokratio por Germanio kaj la tuta Eŭropo. Tiu ĉi kastelo do simbolas la lukton por civitanaj rajtoj en Eŭropo. En la ekspozicio, kiun ni rigardis, oni donis atenton al ĉi tio kaj ĝiaj aspektoj, kiel gazetara libereco.

Vendrede ni estis en Heidelberg Malnova Urbo (Heidelberg-Altstadt). En la Sankta Spirito-Preĝejo (Heiliggeistkirche) Wolfram diris, ke la kolonoj de tiu ĉi preĝejo, kiuj nun estas unuformaj helbrunaj, iam estis pentritaj kvazaŭ arboj, kun branĉoj, folioj kaj birdoj. En la kastelo de Heidelberg, super la urbo, ni rigardis supergrandan vinbarelon el la jaro 1751 (kies kapacito estas 219 mil litroj) kaj ekspozicion pri la historio de Playmobil.

Sabate ni iris al la Preĝejo de la Trinitato (Dreifaltigkeitskirche) kaj la katedralo de Speyer. La Preĝejo de la Trinitato estis bela pro siaj multaj pentraĵoj sur la balkonoj kaj kontraŭ la plafono. Mi imagas, ke dum la prediko eklezianoj ofte estas distritaj pro la multaj pentraĵoj. Ĉi tio verŝajne okazas malpli ofte en la Katedralo de Speyer. Ĝi derivas

sian dignon el sia majesta sobreco, preskaŭ sen ornamoj.

Estis interese viziti kelkajn urbojn de Rejnlando-Palatinato (Rheinland-Pfalz) kaj Baden-Virtembergo (Baden-Württemberg). Pro vojaĝado tien kaj reen en unu posttagmezo la tempo por vidi multon estis tre limigita. La ekskursoj do fariĝis pli kiel pilgrimadoj, en kiuj ni havis tempon interparoli inter si kaj kun niaj kunvojaĝantoj. Ĉi tio estis bone, ĉar matene estis malmulte da tempo por konversacioj. Persone, mi ŝatus havi pli da tempo por konversacioj pri kredo unu kun la alia. Sed ankaŭ tiel estis bone.

Dimanĉe matene ni havis diservon kune kun eklezianoj en Preĝejo sur la Haardt (Kirche auf der Haardt) en la urbo. La festo estis en la germana kaj Esperanto. La loka paroĥestro kaj Wolfram gvidis la festadon. La prediko temis pri Luko 22, kiu priskribas Petron negantan Jesuon tri fojojn post kiam li estis arestita. Versiklo 61 diras, “La Sinjoro turnis sin kaj rigardis Petron, ...” Ĉi tiu rigardo de Jesuo ne estis akuzo kaj ne sonis kiel: “Mi jam diris al vi ...” Ne, ĉi tiu rigardo de Jesuo estis malferma, ama rigardo. Por mi, ĉi tiu prediko estis belega fino de ĉi tiuj Bibliaj Tagoj. ☞



De maldekstre: Wolfram Rohloff (DE), Tereza Pomorska (PL), Philippe Cousson (FR)

Financa raporto de KELI 2023

(ĉiuj sumoj en EUR)

Bilancoj fine de la jaroj
2022 2023

Aktivoi

Stoko de libroj	4.925,03	4.432,50
Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	104,40
<i>Provizo</i>	<u>5.041,03</u>	<u>4.536,90</u>

Kasista kaso	1.020,00	1.035,00
Sekretaria kaso	1.024,00	426,00
UEA-konto kelk-p	4.380,14	2.095,10
Ĝir-konto, CIC-banko	1.757,58	1.765,08
Ŝpar-konto, CIC -banko	40.889,08	41.565,47
<i>Monrimedoj</i>	<u>49.070,80</u>	<u>46.886,65</u>

Sumo de aktivoj

54.111,83 51.423,55

Pasivoj

Kapitalo	31.373,18	30.819,68
Rezulto de la jaro	-553,50	-1.245,15
<i>Kapitalo entute</i>	<u>30.819,68</u>	<u>29.574,53</u>

Dumvivaj membroj	1.414,50	1.296,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	560,08	560,08
Kongresa rezerva kaso	403,48	403,48
Literatura/Himnara kaso	12.903,58	12.903,45
<i>Fondusoj entute</i>	<u>22.176,15</u>	<u>21.539,02</u>

Kreditoroj	0,00	0,00
Evidente	1.086,00	215,00
KELI-abonoj de EK	30,00	0,00
Kongresaj kotizoj	0,00	100,00
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>1.116,00</u>	<u>310,00</u>

Sumo de pasivoj

54.111,83 51.423,55

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2023.12.31

Aktivoj

Stokoj

La estraro decidis, ke dum la sekvontaj dek jaroj la valoro de la stokoj estos malaltigita per dek procentoj jare (ĉe libroj 492,5 euroj, ĉe kasedoj 11,6 Euroj). Ni klopodos fordonaci librojn kaj kasedojn al nepagipovaj landoj.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU, kutime kun malalta sumo.
Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.
KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe la franca CIC banko (ĝir- kaj ŝpar-konto).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj.
La rezulto de la jaro 2023 estis bedaŭrinde negativa: - 1.245,15 Eŭroj.

Fondusoj

Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj.
Estas plano simpligi nian librotenadon per kunmetado, sumigo de la diversaj kasoj.

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2023 ni havis kongreson (en Bjalistoko, Pollando), kaj dum la kongreso ni kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). Ankaŭ sendis KELI-anoj tiucele monon al la bankkontoj. La sumon kiel kutime ni ĝiris al la fonduso helpi tiun laboron, kiun komencis Jacques Tuinder NL.
Aliĝantoj al nia kongreso en 2024, en Vác, Hungario rajtas pagi la aliĝkotizon al KELI bankkontoj, tiu sumo estos ĝirita al LKK.

Rezulto 2023 kaj buĝetoj 2023, 2024 kaj 2025 (ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2023	Rezulto 2023	Buĝeto 2024	Buĝeto 2025
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.200	1.446,00	1.600	1.400
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	5,93	0	0
Adopta Kaso	350	20,00	100	80
<i>Kotizoj entute</i>	<u>2.550</u>	<u>1.471,93</u>	<u>1.700</u>	<u>1.480</u>
Librovendado	50	23,80	50	40
Rentumoj	25	676,39	500	500
Profito el kongreso	0	0,00	0	0
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>75</u>	<u>700,19</u>	<u>550</u>	<u>540</u>
Enspezoj entute	2.625	2.172,12	2.250	2.020
Elspezoj				
Presado + sendado de DR	2.600	2.889,00	2.300	2.000
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2.600</u>	<u>2.889,00</u>	<u>2.300</u>	<u>2.000</u>
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	20	20,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>260</u>	<u>260,00</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
UEA-kotizo	65	44,00	50	50
Bankkostoj	65	141,77	120	120
Merituloj	50	45,00	50	50
UK Lukostoj	50	37,50	40	40
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	<u>230</u>	<u>120,76</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	0	0
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	0	0
Malprofito de la kongreso	0	0,00	0	0
Rabatoj de perantoj	5	0,00	0	0
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>25</u>	<u>0,00</u>	<u>0</u>	<u>0</u>
Elspezoj entute	3.115	3.417,27	2.820	2.520
Saldoj	-490	-1.245,15	-570	-500

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2023 kaj la Buĝetoj 2024/2025

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2023 bedaŭrinde estis multe pli malaltaj ol planitaj,. Ankaŭ al la Adopta kaso alvenis malpli da mondonacoj ol ni esperis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui „laŭforte”. Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Librovendado estis malpli, sed la rentumoj estis multe pli altaj, ol ni planis. Aliaj enspezoj ne okazis.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2023 ni per la kutima simbola sumo dankis la laboron al nia prezidanto, sekretario, redaktoro kaj kasisto.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2023 estis la UEA-kotizoj kaj la Bankkostoj. Ni dankis la laboron al membroj de LKK (Merituloj), kaj laŭkutime ni pagis la duonon de la lukosto de salono dum UK.

Aliaj elspezoj

Aliaj elspezoj ne okazis en la jaro 2023.

Saldoj

La saldo de la jaro 2023 estis bedaŭrinde negativa: - 1.245,15 Eŭroj. Nia membraro malnombriĝas, sed ĝis la ekonomiaj eblecoj permesas, ni planas daŭre funkciigi nian Ligon. La du gravaj partoj de nia funkciado: eldoni nian revuon surpapere (kaj ne rete), kaj organizi enhavriĉajn, interesajn kongresojn por kotizo, kiom eble plej multaj partoprenantoj povas pagi. Ambaŭ partoj bezonas subtenadon, sed la estraro kredas, ke tiel ni korekte uzas la mondonacojn de niaj nunaj membroj kaj de niaj antaŭuloj. La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2024 kaj 2025 tamen enhavas negativan rezulton. Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2023

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2025
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) *Ĉi-jare finiĝas la deĵor-periodoj de Bengt Olof Åradsson, Pavel Polnický kaj Václav Pospíšil. Ĉiuj estas reelekteblaj.*

(13) *Propono pri la KELI-kongreso 2025: ...*

Kontrolado de la kaso de KELI por la jaro 2023 post Kristo

Karl Heinz Schaeffer kaj Norbert Südland

kontrolis la kason de KELI koncerne la jaro 2023 laŭ la informoj de la kasistino

Ágnes Ráczkevy-Eötvös

kaj trovis nenian problemon ĉe la stato de la 16-a Marto 2024.

Ili rekomendas la senŝarĝigon de ŝi per la membraro de KELI por la jaro 2023.

Kiam la membraro ne povas kunveni, tiam la estraro decidu pri tio.

Aalen, 06.05.2024.
loko, dato

Karl Heinz Schaeffer
Karl Heinz Schaeffer

Aalen, 04.05.2024
loko, dato

Norbert Südland
Norbert Südland

Informetoj

Ni gratulas

Nia multjara estrarano kaj sekretariino, Els van Dijk, festis sian 80-jariĝon la 3an de junio.

Multajn gratulojn kaj bondezirojn.



Els van Dijk dum kongresa ekskurso en Poděbrady 2011

Ĉu vi sciis pri:

Diatesarono

Nomo de evangelia harmonio kompilita ĉirkaŭ 170 p.Kr de Tacjano. Laŭ fragmentoj trovitaj en Dura Europos oni supozas, ke ĝi estis skribita en la greka kaj tradukita de la aŭtoro mem en la sirian. Ĝis nia tempo krom supre menciita mallonga greka fragmento konserviĝis fragmentoj de siria traduko, araba traduko, persa traduko kaj ĝiaj spuroj en aliaj verkoj. Ĝi ludis gravan rolon en Sirio, kie ĝi estis ĝenerale uzata ĝis la 5-a jc, kiam anstataŭis ĝin Peŝita’.

Laŭ Biblia Vortaro (1975) de H. Paruzel, E. Wojtakowski, J. Lazoni kaj R. Di Prinzio

Okulo ne vidis

Kp. 1 Kor 2, 9



1. O - ku - lo__ ne__ vi-dis, o - re - lo__ ne__ aŭ-dis
2. Sen-ce - le__ ni__ va-gus kaj van - te__ ni__ a-gus
3. Ne-ce - sas ku - ra-ĝo, kom-pre - no__ kaj sa-ĝo,
la pre - pa - ri - ta - ĵon de__ Di'__ por ni.
sen o - ri - en - ti - ĝo en__ ni - a Di'.
li - be - ro,__ in - spi - ro kaj__ e - ner - gi'.
Mi, Di - on__ a - man - te, stre - bu__ al__ Li.
Min fid'__ kaj__ es - pe - ro gvi - du__ al__ Li.
Do: Ve - nu,__ Spi - ri - to. A - gu__ en__ mi.

La lastan linion oni povas ripeti.

OKULO NE VIDIS • kp. 1 Kor 2, 9 • M (sub la influo de la germana popola rondkanto „Es tönen die Lieder“) kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2023-06-16.

Ankaŭ kantebla rondkante laŭ „Es tönen die Lieder“.

*I Kor 2, 9 ...Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis,
kaj kio en la koron de homo ne eniris,
Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas*